

KONTAKTO

numero 237 (2010:3)

ISSN 0023-3692

Interesaj urboj

*La urbo naskita de
la lingva konflikto!*

*La urboj, kiuj ne troveblas
sur la mapoj*

Homeopatio: la diluita medicino

“Valen buiten!” aŭ Kion foje povas naski la lingva konflikto?

Alexandre Baudry, Nederlando 3

La urboj, kiuj ne troveblas sur la mapoj

Aleksandro Galkin, Rusio/Germanio 4

Sedeso el Arĝedo aŭ la neceseja filozofio

Roman Dobrzyński, Pollando 6

Malkovru la urbon Brno! Miroslav Hruška, Ĉeĥio 8

Homeopatio: la diluita medicino

Aleksej Vodovozov, Rusio 13

Sendormeco

Gabrielo Olúbunmi Òshó-Davies, Niĝerio 14

Gangsteraĵo sufiĉe altkvalita

(recenzo) 16

Saluton, karaj legantoj de *Kontakto*!

Tiu ĉi numero, dediĉita ĉefe al “interesaj urboj”, kiel ĉiam rezultis sufiĉe bunta laŭ la tuŝitaj temoj. Krom la rakontoj pri kelkaj interesaj urboj (inter ili – ankaŭ pri kelkaj fikciaj urboj!) vin atendas granda kaj – mi esperas! – interesa artikolo pri homeopatio (kiu ne trovis sufiĉe da spaco en la antaŭa “medicina” numero). Plie, vi trovos sur la paĝoj de la revuo recenzon pri la nova disko de Vinilkosmo kaj du diverstemajn, sed pensigajn beletraĵojn.

Mi memorigas, ke viaj kontribuoj estas ĉiam bezonataj kaj ege atendataj! Bonan legadon, sukcesojn kaj bonfarton deziras al vi

Paŭlo,
la redaktoro.

Kiel sendi kontribuojn al *Kontakto*?

- ✓ Sendu prefere tekston originale verkitan en Esperanto aŭ foton/bildon memfaritan.
- ✓ Se vi sendas tradukon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Ĉe fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi.
- ✓ Kontakto ne estas movada revuo, do ne sendu al ĝi primovadajn raportojn!
- ✓ Indiku, ĉu via artikolo jam aperis, aŭ estas proponata al alia revuo.
- ✓ Fotoj devas esti bonkvalitaj, ne gravas ĉu nigrablankaj, ĉu koloraj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- ✓ Dikajn kovertojn prefere sendu registritaj.
- ✓ Rete bonvolu sendi vian artikolon kiel kutiman retmesaĝon aŭ RTF (bv uzi x-kodon por supersignaj literoj); bildojn – kiel JPEG (150-300 dpi)
- ✓ Ilustraĵoj kaj adresoj en la interreto, kiuj rilatas al via temo, estas tre bonvenaj!

Temoj de la venontaj numeroj de *Kontakto*

Numero 238 (2010:4). La ĉef-temo: “Katastrofoj”.

Bedaŭrinde, jes, katastrofoj foje okazas, jen naturaj, jen sociaj. Kutime ili havas detruan efikon, tamen foje helpas ankaŭ pri mobiliziĝo kaj unuiĝo.

Rakontu pri iu katastrofo, kiu tuŝis vin persone aŭ kiu aparte impresis vin!

Numero 239 (2010:5). La ĉef-temo: “Juneco”.

Juneco estas, certe, la plej bona aĝo, tamen, kun siaj propraj problemoj kaj malfacilaĵoj. Kiaj estas la avantaĝoj kaj malavantaĝoj esti juna? Kiajn specifaĵojn havas la juna aĝo en diversaj landoj de la mondo? Rakontu pri viaj spertoj kaj kundiskutu!

La limdato – la 1a de oktobro.

Kiel ĉiam, ajnatemaj kontribuoj estas bonvenaj kaj ege bezonataj!

KONTAKTO: Dumonata socikultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo** (TEJO), eldonata de **Universala Esperanto-Asocio** (UEA). Fondita en 1963. **N-ro 237 (2010:3)**, 45-a jarkolekto. **ISSN** 0023-3692. **Legata** en ĉ 90 landoj. **TTT-paĝo:** <<http://www.tejo.org/node/7>>. **Eldonanto** (administrado, abonoj, anoncoj): **UEA**: ☒ Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44, fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <uea@inter.nl.net>. **Redakcio:** Kontakto, ul. Rabochaja 24, kv. 29, Jalto, Krimeo, UA-98612, Ukrainio; ret-adreso: <kontakto@tejo.org>. **Redaktoro:** Paŭlo Moĵajev (Ukrainio) **Tipografisto:** Lucas Vignoli Reis (kun helpo de skipo de Preface Design, <<http://www.preface.com.br>>). **Korektisto:** Aleksandro Galkin (Rusio/Germanio). **Presado:** Skonpres, Bydgoszcz (Pollando), ret-adreso: <skonpres@poczta.onet.pl>. **Konstantaj kunlaborantoj:** Joel Amis (Usono), Tatjana Auderskaja (Ukrainio), Daniel Richard Bebelacqua Acosta (Urugvajo), Daniele Binaghi (Italio), Olivier Gaudefroy (Francio), Etsuo Miyoshi (Japanio), Olubunmi Osho-Davies (Niĝerio), Maksim Petrov (Kazahio), Saliko (Finnlando), Aneta Ubik (Germanio), Jefim Zajdman (Ukrainio). **Facilgvaj Artikoloj** estas verkita en la niveloj *tre facila* kaj *facila*, laŭ la vortolisto de Kontakto. Tiu listo aperas en la unua numero ĉiujare. **Anonctarifo:** tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas duoble. Por E-organizaĵoj 50% da rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajn de 30%. Por anoncoj bv. kontakti UEA. **Anoncetaj:** por *Anonctabulo* kostas tri internaciajn respondkuponojn kontraŭ dek vortoj. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA. **Abontarifo:** varias laŭlande. Petu informojn de UEA. **Malfortvidantoj:** povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu 60-minutajn kasedojn al Elise Lauwen, Salahutplein 40, NL-5262 ZN Vught, Nederlando. **Kontakto en radioj:** Regiono / tempo (UTC) / metroj / frekvenco (kHz): Radio Havano (Kubo) Okcidenta kaj Norda Ameriko kaj Pacifika Azio / 7:00/31/9 820; Tuta Ameriko kaj Karibio / 15:00, 23:30/25/11 760; Eŭropo Mediteranea/ 19:30, 22:00/21/13 715; <<http://216.138.240.229/rc4>> (je la 15-a horo UTC), <http://roi.roi.at/esperanto/es_demand.html> (laŭ mendo tra la servilo de Austria Radio Internacia). **La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

“Walen buiten!” aŭ Kion foje povas naski la lingva konflikto?

Se iutage vi decidis viziti Belgion, jen inda afero por scii: Loveno (Louvain en la franca, Leuven en la nederlanda) kaj Loveno-la-Nova (Louvain-la-Neuve, aŭ LLN) estas du malsamaj urboj. Multaj turistoj jam erare iris al unu el la urboj intencante iri al la alia... Tamen, kompreneble, la simileco de tiuj nomoj havas kialon, ĉar iusence, ĝi estis iam la sama urbo, aŭ pli precize, ĝi estis iam la sama universitato.

Alexandre Baudry, Nederlando

La universitato de Leuven estas tre malnova, ĝi estis fondita en 1425. La kursoj estis unue en la latina kaj poste en la franca kaj la nederlanda. Pro la proksimeco de la lingvaj limoj, la influo de la francparolantoj (valonanoj kaj bruselanoj) estis granda en tiu regiono de Flandrio (kie oni ĉefe parolas la nederlandan). Tial la universitaton frekventis kaj nederlandlingvaj, kaj franclingvaj studentoj, sed tiuj du komunumoj ne vere emis miksiĝi kaj, fakte, malŝatis unu la aliajn.

En 1966, kiam surstrate oni ripete aŭdis “Walen Buiten!” (“Valonanoj for!”), oni decidis, ke la tuta universitato de Loveno kaj ties 10 fakultatoj devas dividiĝi en du partojn: la nederlandlingva (KUL: Katholiek Universiteit Leuven) kaj la franclingva (UCL: Université catholique de Louvain), kaj tiu lasta devis trovi novan lokon en franclingva parto de Belgio.

En 1969 UCL akiris la rajton aĉeti 900 hektarojn da kampoj kaj arbaroj, sur kiuj ĝi fondis ne nur novan universitatan centron, sed ankaŭ tute novan urbon, 20 kilometrojn oriente de la fama Waterloo kaj 30 kilometrojn sude de Bruselo – kaj ĝi ricevis la nomon Loveno-la-Nova. Kompreneble, oni bezonis multan tempon por konstrui ĉion, tial la 9 fakultatoj (la medicina fakultato translokiĝis al Woluwe, Bruselo, ĉar la universitata hospitalo devis troviĝi ĉe granda urbo) kaj ĉirkaŭ 20 mil studentoj translokiĝis nur iom post iom.

Sed Loveno-la-Nova estas interesa ne nur pro sia tipe belga historio. Ankaŭ ĝia arkitekturo estas menciinda. La urbocentro estas, fakte, grandega ŝtonplato, sub kiu veturas aŭ povas esti parkitaj la aŭtoj, kaj sur kiu la homoj povas piediri tute sen esti ĝenataj de la aŭtoj. Dank’ al tio ĝi estas aparte agrabla urbo por promenemuloj kaj biciklantoj, ankaŭ pro la fakto, ke piedirantoj povas eviti la pluvon marŝante tra eksteraj koridoroj. La piediranto havas



Sur la foto videblas la flankaj koridoroj, kiuj povas parte protekti la piedirantojn kontraŭ pluvo.

strangan impreson marŝi tra ia miksaĵo de mez-epoka kaj moderna stiloj, iom labirinteca.

Tamen, aspekte ĝi ne estas aparte alloga urbo. Ĝi aspektas kiel miksaĵo de brikoj (tute kutima konstrumaterialo tie) kaj betonaj (betono oportunas por rapida konstruado). Plie, malgraŭ tio, kion oni povus supozi, LLN ne havas tutrektajn stratojn kiel la junaj usonaj urboj. Tamen, oni ĉiam miras, kiam homo diras “mi memoras, kiam ĝi estis kampara vojeto”, parolante pri la ĉefa strato.

La urbo, kompreneble, spiras laŭ la studenta vivo, eĉ se ekde 1999 la kvanto de nestudentoj superas la studento-kvanton. Ĝia loĝantaro ĉiam kreskas, parte pro tio, ke ĝi ja apartenas al la ĉirkaŭurboj de Bruselo. Pro tiu kialo kaj pro la universitato, multaj firmaoj instaligis ĉi tie. Lastatempe aperis ankaŭ komerca centro kaj muzeo pri Hergé (fama belga komiks-faristo), kiuj esperas profiti de la proksimeco de E411 – la aŭtoŝoseo, kiu ligas Bruselon kaj



La foto vidigas la "subteran" aŭtejon de la urbo

Luksemburĝon. La urbo estas ankaŭ landskale konata pro la ĉiujara evento "24 heures vélo" ("24-hora biciklado"), kiam teamanoj de biciklemuloj unu post la alia rondiras la urbon dum unu tago por gajni monon aŭ nur por amuzo. Tiu evento fariĝis, fakte, granda studenta festivalo.

Do, vojaĝemulo, se iam vi venos en Belgion, nepre memoru tiun anekdoton. Kompreneble, same kiel multajn aliajn urbojn de Belgio, indas aparte viziti ankaŭ "la malnovan" Lovenon. Sed nepre indas malkovri ankaŭ "la novan", kiu antaŭ 40 jaroj ekzistis nur surpapere.

La urboj, kiuj ne troveblas sur la mapoj

Ekzistas urboj, kiujn oni vane serĉos sur la mapoj. Tamen tiuj urboj estas konataj al pluraj homoj, ili vivas sian propran vivon kaj tie vivas homoj, kiujn ankaŭ multaj konas. Ne nur la urboj, ofte eĉ la tutaj landoj ne aperas sur la mapoj, almenaŭ ne sur la kutimaj mapoj. Mi ne parolas pri iuj sekretaj urboj aŭ subteraj militaj fortikaĵoj, tute ne. Mi parolas pri la urboj, kiuj aperas en diversaj popularaj beletraĵoj kaj estas konataj dank' al ili.

Aleksandro Galkin, Rusio/Germanio

Anĥ-Morpork

Ĝi estas sendube la plej konata urbo el scienc-fikcia beletro. Ĝi unue aperas en la plej unua romano el la tre fama serio "Diskmondo" (Diskworld) fare de Terry Pratchet, sur kies unuaj 20 paĝoj la legantoj travivas la "vican" preskaŭ plenan pereon de la urbo pro incendio. Tamen, la urbo plu aperas en postaj romanoj el la serio, kaj ĉiu nova verko aldonas per fajnaj penik-movoj pliajn detalojn al la riĉa kaj pitoreska priskribo de la urba ĉiutaga vivo.

En la unua romano de la serio, "Koloro de Magio", la protagonistoj rapide forlasas la urbon kaj neniam plu revenas al ĝi; tial la etoson de la urbo eblas ekkoni nur supraĵe kvazaŭ tra la okuloj de naiva turisto Duflor, kaj la ĉefaj travivaĵoj en la urbo estas nur tiuj de hazarda vizitanto: unua ekkono de gildoj, taverna interbatalo ktp. En la sekvaj romanoj oni detale priskribas la gardistan servon ("Gardisto! Gardisto!"), la poŝtan sistemon ("Forpoŝtiĝu!") ktp.

La roman-serio de Pratchet estas unuavice konata pro sia iom nekutima ĝenro: ironia scienc-fikcio. Ĉiu romano estas parodio pri tipaj kliŝaj scienc-fikciaj kaj fantastaj romanoj, samtempe estante ankaŭ la ironia kaj iom bufona respegulo de certaj sociaj fenomenoj, kiujn ni foje tute ne rimarkas aŭ ne volas agnoski.



Blazono de la urbo Anĥ-Morpork

Bona ekzemplo estas la himno de la urbo. Ĝi havas nur la unuan strofon, dum la dua strofo havas nur la komencan kaj la plej lastajn du liniojn (kiuj, interalie, parte ripetigas el la unua strofo), la resto estas nura murmurado laŭ la mizuko. Kaj tiu murmurado estas fakte la oficiala versio de la himno pro la plej simpla preteksto – ja ĉe ĉiuj aliaj himnoj oni apenaŭ memoras la tekston de la tuta himno, kutime oni memoras nur tiun de la plej unua strofo. La aŭtoro ironie rimarkas: "kutime oni plej laŭte kantas ĝuste la duan strofon por montri, ke oni vere scias ties vortojn".

Minas Tirit

Tiun urbon konas ĉiu, kiu iam legis aŭ spektis la faman trilogion de Tolkien pri la Ringo de la Absoluta Potenco kaj duonkreskula popolo hobitoj, kiuj sukcesas porti la ringon al ties origina forĝ-loko kaj detrui ĝin. Kaj la urbo Minas Tirit ludas unu el la ĉefaj roloj en tiu trilogio, estante la ĉefa bastiono kaj ĉefurbo de Gondor, la fikcia ŝtato de homoj, kiu estas la ĉefa apoganto kaj aliancano de la bonaj fortoj en la romanaro.


Minas Tirit signifas en la sindarina lingvo “La Turo de Gardo”, kaj tiun nomon la urbo ricevas pro sia rolo kiel ĉefa fortikaĵo en la milito kontraŭ malicaj fortoj. La urbo unue, fakte, havis la nomon Minas Anor (“La Turo de Suno”) kaj estis ĝemelurbo por “Minas Itil” – “La Turo de Luno”. Tiu estas konkerita de Mordor kaj alinomita al “Minas Mozgul” (“Turo de Nigra Magio”) kaj la du urboj, konstruitaj kiel fortikaĵoj preskaŭ laŭ la sama urboplano, ege similas unu la alian, sed aperas en la filma prezento de la romano en diversaj koloroj: unu – plene blanka (pro blankaj brikoj), kaj la dua – plene nigra pro fulgo el sub la kaldronoj de nigraj magiuloj.

Tolkien mem donas tre detalan priskribon kaj eĉ la urbomapon de tiu urbo en siaj taglibroj. Ĝuste pro tio oni sukcesis tiom detal-riĉe kaj fidele rekonstrui la urbon en la filmo. La urbo estas fakte unu granda kaj kompleksa labirinto, kies celo estas malhelpi al la sieĝantoj kaj atakantoj atingi la urbocentron kaj konkeri ĝin.

Z’haĉdum

La sekva geografia loko estas ne urbo, sed eĉ planedo el la fama scienc-fikcia televida serio “Babilono 5”. La serio, kiel ofte en sukcesaj scienc-fikciaj verkoj, rakontas pri la eterna batalo inter la Bono kaj Malico, riveliĝantaj en la serio forme de la du diversaj rasoj: Vorlonoj (la bonaj) kaj Ombroj (la malbonaj). La historio disvolviĝas tiel, ke oni ne tuj ekscias pri la venanta danĝero – kaj informiĝas pri la raso de la Ombroj kaj ties militaj planoj nur iom post iom. Krome, oni dum longa tempo tute ne havas iun eblon protekti sin kontraŭ la kosmoŝipoj de tiu raso, kaj ĉio en la serio estas farata por eĉ pli streĉi la intrigon.

Z’haĉdum estas la planedo, kiu evidentiĝas esti la hejma planedo de tiu kruela raso, la Ombroj. Ĝi estas deekstere nur morta planedo sen ajna konata vivo: la Ombroj pro multaj atakoj de la planedo jam delonge vivas en profundaj kavernoj kaj tuneloj kaj ne estas detekteblaj tie per kutimaj navigaciaj sistemoj. Dum kulmino de la serio la komandanto de la aliancaj fortoj, Kapitano Sheridan, vizitas la Ombrojn en ties citadelo por intertraktado. Laŭ profetaĵo li devas trovi tie sian morton. Sed evidentiĝas, ke ne ĉio estas tiel simpla, kiel ni pensis, kaj krom la Ombroj tie loĝas ankaŭ aliaj rasoj, kaj ankaŭ la maliceco de la Ombroj estis nur



parto de propagando...

Do, Z’haĉdum rolas en la serio kiel ŝlosilo por multaj sekretoj kaj estas, post la kosma stacio Babilono 5, verŝajne la plej konata loko tie.



Smeralda Urbo

Verŝajne, ĉiu legis tiun fabelon dum sia infanaĝo. La fama historio pri magiisto el la lando Oz (en la ruslingva versio eĉ rekte “el la Smeralda Urbo”), verkita antaŭ pli ol 100 jaroj fare de la usona aŭtoro Frank Baum estas unu el la plej sukcesaj fabelaj serioj por infanoj en la tuta mondo.

Tre amuza estas la fakto, ke en la ruslingva medio la origina verko de Baum tute ne estas konata. Anstataŭe, tre populariĝis la rerakonto de tiu verko fare de la rusa (poste – sovetia) tradukisto kaj verkisto Aleksandro Volkov. Volkov (estante, interalie, matematikisto laŭ la fako; dum longa

tempo li estis docento de katedro pri supera matematiko en Moskvo) tre libere rerakontis la historion pri la orfa knabino el Kanzaso, kaj tiu rerakonto estis publikigita en Sovetunio kun lia aŭtoreco kaj sub la nomo “Magiisto el la Smeralda Urbo”. La libro rerakontas la eventojn el la unua libro de Baum kaj havas nenion komunan kun la similnoma verko de Baum “Smeralda Urbo de Oz”.

Kompare al Baum, kiu sukcesis verki 12 librojn en la serio pri la magia lando Oz, la rusa versio konsistas nur el ses libroj. Krom la plej unua libro, kiu en la rusa versio, kiel jam menciite, estas la rerakonto de la unua libro el la origina serio, ĉiuj aliaj verkoj de Aleksandro Volkov estas tute sendependaj kaj neniom rilataj al la verkoj de Baum. Eĉ la unua libro malgraŭ la simileco de ĉefaj eventoj havas

multajn diferencojn disde la origina usona verko, eĉ la nomo de la protagonistino estas alia: la origina orfino Dorothy en la rusa versio nomiĝas Elli kaj havas gepatrojn.

Ege amuza estas la destino de tiu verko en Germanio. Pro la disdivido de la lando, en la ĝia okcidenta parto populariĝis la originala versio, dum en la orienta parto – la sovetia. Krom en la germanan la rusa versio estis tradukita en pliajn naŭ lingvojn kaj ĝia suma eldonkvanto superis, laŭ Vikipedio, 30 milionojn da ekzempleroj. Diference de multaj daŭrigoj de la originala serio fare de diversaj aŭtoroj (la lasta libro en la serio aperis eĉ en 2007!), la rusa versio neniam estis daŭrigita kaj jam dum longa tempo restas klasika kaj modela verko de la sovetia porinfana literaturo.

Sedeso el Argedo aŭ la neceseja filozofio

Kiam Pollando ludis la rolon de “la plej gaja barako”, oni ŝatis ridi pri karambolaj kunmetaĵoj kiel: trabant-limuzino aŭ sovetiaj parlamentanoj. Sed oni inventis ankaŭ proprajn karambolaĵojn, kiel tiujn pri la grandaj pensuloj: Taleso el Mileto, Erasmo el Roterdamo, Sedeso el Argedo kaj Kaco el Komitato. Mi klarigas, ke Argedo estis ne loĝloko de iu granda filozofo, sed la ŝtata komerca entrepreno, kiu specialiĝis pri vendado de varoj por hejma mastrumado, inkluzive de necesejaj akcesoraĵoj. Do Sedeso koncernas ne la kapon de saĝulo aŭ de stultulo, sed la inversan parton de la homa korpo; temas pri neceseja sursidilo. Aliflanke la vorto Kaco estas klare komprenebla kaj pravas, kiel vortlud-kapabla estas la lingvo internacia; oni eĉ ne devus skribi: Kaco el Komitato, sufiĉus: Kaco el K.C.¹. Ĝi nun estas kaco rompita fare de la vento de historio. Amen!

Roman Dobrzyński, Pollando

Unua sceno

Sedeson el Argedo mi retrovis en Japanio, sed tiel ŝanĝitan, ke mi definitive komprenis: jen la vera 21-a jarcento! Mi sentas min flugi en kosmoŝipo... Imagu komfortan sidilon, kvazaŭ fotelon, provizitan dekstraflanke per impona panelo kun flagrantaj diodoj kaj plurkoloraj prembutonoj; subkonscie mi serĉas sekurec-rimenojn. Gapante sur la diodojn de la panelo, mi subite eksentis min perdita, ĉar iliaj funkcioj montriĝis nedeĉifreblaj; ĉiuj klarigoj estis skribitaj japane.

Per la metodo de provoj kaj eraroj mi malkovris, kiel oni akvumas la pelvon kaj reguligas la temperaturon de la sursidilo. Mi provis plu “kuraĝe”, sed tamen “flankiĝante”,

ĉar necesis surgenuiĝi kaj klini la kapon super la sursidilon, por esplori la reagojn de la kaose premataj butonoj. Subite de sub la sursidilo elrampis tubo kun truetoj, kiuj similigis ĝin al transversa fluto. Ĝi subite ŝprucis akvon sur miajn vangojn. Tuj mi komprenis, ke ĝi fakte celis la sidvangojn. La akvo ŝprucis kaj mi ne povis trovi la butonon por malŝalti la fontanon. Finfine estis trafita la butono respondeca pri tiu funkcio. Pluajn eksperimentojn mi faris pli atenteme kaj malkovris, ke la tubeto alimaniere elŝoviĝas por priservi... sinjorinojn, kaj estas ankaŭ alia, el kiu blovas varma aero, por sekigi la ĵus lavitan organon.

Kiel agrable oni sidas sur la varmeta, japana kuzo de *Sedeso el Argedo*! La komforto instigas al filozofumado.

Do, kiom da jarmiloj travivis la generacio, kiu siatempe ekkonis la budetojn de la ĉefministro Sławoj-Skłodkowski² kiel pinton de moderneco, kaj nun povas sidiĝi ĉe la paneloj de elektronika necesejo?

Dua sceno

Kameoka, kie mi aktuale loĝas, estas malgranda urbo laŭ la japanaj kriterioj; ĝi havas nur 100 mil loĝantojn. En ĝia centro najbare situas du grandaj magazenoj; ili ŝajnas paro de sumo-atletoj, luktantaj brak-en-brake. En ambaŭ mi trovis fakojn kun akcesoraĵoj por necesejoj. Oni eksentas kapturigojn, vidante riĉan oferton de elektronikaĵoj, kiuj faciligas maltrinkadon kaj aliajn malojn. Primitivaj sursidiloj, uzataj en Eŭropo, tute ne ekzistas. Tie ĉi ili ĉiuj estas rembursitaj per elektroniko, sed ne samgrade, kion oni povas konstati laŭ la nombro de prembutonoj kaj kontrol-lampetoj. La japanaj sursidiloj diferencas inter si per funkcioj kaj prezoj. La prezoj de tiuj neces(ej)aj aparatoj draste malsamas kaj verŝajne respegulas la ekonomian distavoliĝon de la loka socio. La plej simplaj estas akireblaj kontraŭ proksimume 100 eŭroj. La prezoj kreskas ĝis eĉ 1000 eŭroj proporcie al la funkcioj, programitaj en la sursidiloj. Rigardante la flagrantajn diodojn kaj plurajn prembutonojn, mi pensas, kiom longe oni devas studi, por scipovi lerte manipuli ilin, aparte en la kazoj de urĝa neceso.

Japanoj komprenas malfacilaĵojn, kiuj tiakaze povus embarasigi eksterlandanojn. Tion mi konstatis en hotelo, vizitante la urbon Kobe. Lukseco de mia ĉambro ŝajnis neadekvata kompare al ĝia necesejo, kies sursidilo estis provizita per nur tri butonoj. Mi ekĝojis, ke la klarigoj ne estis ĉi-foje skribitaj japanlingve, sed anstataŭis ilin bildetoj tiel realismaj, ke ne eblas erari, kiu butono funkciigas virinan bideon kaj kiu – la viran. Krome mi rimarkis la mankon de butonoj por reguligi la varmecon de la sursidilo. Evidentiĝis, ke ĝi tute ne estas varmigata. Kial? Subite mi malkovris: en mia hotela necesejo estas varme, do ne necesas varmigi la sursidilon.

En Japanio, ekskludante ĝian nordan parton, vintro daŭras mallonge kaj ne estas tre frosta, tial oni ne instalas en domoj komplikajn sistemon de varmigado. Male, pli gravas malvarmigado de la dominternoj dum sufokaj someroj. Por tiu celo oni havas klimatizilojn, kiuj vintre servas ankaŭ kiel varmigiloj. Sed oni ne instalas klimatizilojn en necesejoj, ĉar la varmigeblaj sursidiloj kostas malpli. Kaj kial oni kompakte kunmetas pelvon, sursidilon, bideon kaj sekigilon? Ĉar tiamaniere oni ŝparas spacon, kiu ĝenerale mankas en Japanio kaj aparte – interne de konstruaĵoj.

Tria sceno

Kameoka signifas “Testuda Monteto”. Tiu monteto fakte

troviĝas en la centro de la urbo. Iam staris sur ĝi kastelo de ŝoguno. Antaŭ unu jarcento la tereno fariĝis proprietaĵo de Oomoto, la kultur-religia movado, kiu aranĝis tie sian administran centron. Kiel gasto de Oomoto mi ŝatas promeni ĉirkaŭ la pitoreska monteto, kiu, cetere, estas naturrezervejo leĝe protektata. Aparte bela estas fragmento de la kastela fosaĵo, sur kies bordo oni aranĝis romantikan promenejon. Tie staras japanstila pavilono. Ĝi estas ĉiam malfermita. Ĝiaj tri enirejoj estas signitaj per bildoj, tiu vere internacia lingvo; ne eblas erari, kien direktu sin viro, kien – virino kaj kien – handikapito. Sed transpaŝinte kiun ajn el ĝiaj gastamaj sojloj, oni devas halti kaj demeti la ŝuojn; poste necesas surpaŝi lignan podieton, trans kiu troviĝas pantofloj. Tiu higiena postulo estas normala en tuta Japanio. Interne de ĉiu necesejo oni surmetas specialajn ŝuetojn, kutime el plasto. En la esplorata publika necesejo ekzistas ceramika elemento, kies uzon indikas du piedspuroj, sur kiujn oni ekstaras, pli precize – kaŭras, ĉar mankas la sursidiloj.

Ĉu vere gravas tiu manko? Tuj antaŭ la dua mondmilito famiĝis en Pollando medicinisto, kiu doktoriĝis pere de la disertacio “La procezo de fekado en kaŭra pozicio”. Tiu scienca verko, mendita de la armeo, estis vaste aplikata en konstruado de necesejoj por soldatoj. Verdire la doktoriĝinto revelaciis nenion novan, ja kaŭrado dum tiu fiziologia faro estas tute natura pozicio. Do, kial mi entute skribas pri tiu temo? Fakte mi volas atentigi nur pri unu ĝia aspekto. Jen, en la priskribata tradicia pavilono oni renkontas neniun virinon, kiu anticipu postulas pagon pro necesaj agoj kaj malgraŭ tio la necesejo estas brile pura. Ŝajnas, ke oni povas tie fari kirurgiajn operaciojn.

Epilogo

Ne tie estas pure, kie multas purigistoj, sed – kie raras malpurigantoj. Tiu ĉi pola proverbo multe pli bone aplikeblas en Japanio. Tamen oni ne konkludu, ke sufiĉas ne malpurigi kion ajn, por entute ne devi ĝin purigi. Antaŭ kelkaj tagoj en la centro de Oomoto mi estis preterpasanta malfermitan necesejon, kiun tiutempe akvumis virino. Rimarkinte min, ŝi laŭte diris: “Bonan matenon!”. Ĉiuj jam konas min kaj afable salutas, kvankam grandprate ili estas nur “bonantaguloj”. Mi haltis kaj rutine reciprokis la saluton, kliniĝinte laŭ la japana maniero. Sed mi ne povis plu voji, ĉar la sinjorino eliris el sia laborposteno kaj demandis: “Kiel vi fartas?”

Dum en Pollando oni profitas tiun demandon por vei pri siaj malsanoj kaj plendi kontraŭ la registaro, en Japanio oni kutimas nur esprimi kontenton pri sia bonfarto. Same mi reagis al la demando de la sinjorino kaj ŝi tuj transiris al alia rutina temo: la vetero. Post la ŝanĝo de kelkaj aliaj frazoj mi konstatis, ke la sinjorino, spite al mia supozo,

flue regas la Zamenhofan lingvon. Ŝi klarigis, ke antaŭ kelkaj jaroj, fininte Esperanto-kurson, ŝi komencis regule aŭskulti la Polan Radion kaj nun daŭrigas la aŭskultadon per interreto. “La interreto” – ŝi diris, – “permesas kelkfoje ripeti la aŭskultitajn frazojn. Tiel mi ekzercas min pri parolo.”

Baldaŭ mi havis alian okazon konversacii kun la sama sinjorino, kiam mi renkontis ŝin iranta al forĵetejo kun stoko da malbezonaĵoj. Tiam mi laŭdis ŝin pro ŝia riĉa vortprovizo. “Mi multe legas en Esperanto – ŝi respondis, – ankaŭ la polan literaturon mi konas per Esperanto, ekzemple “La Faraono”, “Quo vadis”... Mi demandis, ĉu ŝi konas la polan epopeon “Sinjoro Tadeo”. “Ne” – ŝi respondis, – “mi nur aŭdis pri ĝi”. Finfine mi demandis, en kiu fako de Oomoto ŝi laboras, pensante, ke la purigadon ŝi faras volontule, kio en Oomoto ofte okazas. Kaj ŝi suprize respondis: “Tio estas mia konstanta laboro, mi zorgas pri la forĵetejo, purigas necesejojn ktp. Sed mi ankaŭ verkas utaojn³. Kaj skribos unu por vi.”

La sinjorino nomiĝas Kazuko Takahaŝi. Ŝia familia nomo, Takahaŝi, signifas Alta Ponto.

P.S. Post kelkaj tagoj ŝi vizitis min kun ekzemplero de “Sinjoro Tadeo”, trovita en la biblioteko de Oomoto, kaj citis parkere la unuajn versojn de la epopeo en Esperanto kaj poste en la japana lingvo. Krome ŝi enmanigis al mi ornaman folion kun siaj du tankaĵoj⁴:

*Folioj falas
Susure sur aliajn
Ĉirkaŭ la ŝtonoj,
Tapiŝas la ĝardenon
Kaj ravas mian koron.*

*Blanka ume-flor⁵
Estas brava kaj pura.
Post pluvaj tagoj
Sonoras kristala voĉ⁶
De ugviso⁶ sur la branĉ⁶.*

NOTOJ

1. K.C. – temas pri Centra Komitato de komunista partio.
2. Li famis en Pollando tuj antaŭ la dua mondmilito pro sia kampanjo starigi lignajn necesejojn en vilaĝoj.
3. Utao – japana speco de versaĵo, kiu konsistas el ripetado de 5- aŭ 7-silabaj versoj laŭ diversaj kombinoj.
4. Tankao – la plej populara formo de utao, konsistanta el 31 silaboj ordigitaj en kvin versoj po 5-7-5-7-7 silaboj.
5. Umearbo – japana prunujo, kiu ekfloras jam komence de februaro.
6. Ugviso – japana birdo, kiu per bela kanto anoncas alvenon de printempo.

Malkovru la urbon Brno!

La urbo Brno situas en sudmoravia regiono, kiu estas unu el la 14 regionoj de Ĉeĥio. Ĝi estas plej granda kaj plej grava urbo en tiu ĉi regiono. La urbo havas interesan geografian pozicion: norde, okcidente kaj oriente de ĝi troviĝas grandaj arbaroj kaj ne tro altaj montetoj, dum sude troviĝas ĉefe malaltaĵoj kun vitkampoj. Brno havas internacian flughavenon, bonan trajn-konekton kun la ĉefurbo Prago, sed ankaŭ kun Vieno kaj Bratislavo. Sed ĉu povas Brno proponi ion interesan al turistoj, kiuj decidis viziti ĝin?

Miroslav Hruška, Ĉeĥio

Kun la longa kaj riĉa historio (la urbo estis fondita en 1243; en 1645 ĝi sukcese rezistis al sveda sieĝado) interrilatas ankaŭ multaj historiaj lokoj en la urbcentro. Se vizitanto alvenas de sudo, li povas ekvidi du signifajn dominantojn: katedralon Petrov kaj burgon Ŝpilberk. En la urbcentro

ja estas ankaŭ aliaj preĝejoj kaj placoj (ekzemple, Legoma foirejo). Ne mankas en Brno ankaŭ modernaj domoj kaj vilaoj, ekzemple, Vilao Tugedhat (mondheredaĵo de Unesko) aŭ amuz- kaj aĉet-centro Galerio Vaňkovka (malfermita 5 jarojn antaŭe post rekonstruo de jam longe



ne funkcia fabrika). Brno estas ankaŭ universitata urbo.

En mia memoro estas kelkaj vizitoj de esperantistoj, kiuj kun mia gvido trarigardis mian urbon. Kutime ni bezonis duontagon aŭ unu tagon por rigardi ĉion gravan en la urbocentro. Sed ju pli longe mi vivas en mia hejmurbo, des pli mi malkovras ĉiujn partojn de ĝi. Kaj foje mi sukcesas trovi ion vere malkovrandan! Ekzemple, foje mi trovis privatan bierfarejon, al kiu indus veni por gustumi ĉerizan bieron (nuntempe la bierfarejo havas unu restoracion ankaŭ en la urbocentro). En alia urboparto jam dum kelkaj jaroj funkcias ĝardeno fervojo. Super unu parto troviĝas fama herbejo, kie printempe floras belegaj pulsatiloj. Proksime al unu urba parto situas digolago, kie dum majo kaj junio okazas artfajra konkurso. Sur la digolago veturas ankaŭ elektraj ŝipoj kun vizitantoj de burgo Veveří aŭ de lokaj arbaroj.

Brno ankaŭ estas urbo, kies loĝantoj (aŭ minimume kies politikistoj) povis ĝui diversajn internaciajn vizitojn, ekzemple, de la prezidento de Grekio, papo Benedikto XVI aŭ brita princo Charles.

Kvankam la historia urbocentro de Brno ne estas granda, en la ĉirkaŭaĵo troviĝas multaj interesaj lokoj. Nuntempe ofte okazas diversaj kulturaj kaj sportaj aranĝoj, el kiuj mi nepre devas mencii “Muzean nokton”, “Nokton de preĝejoj”, “Nokton de jonglistoj”, la festivalon “Ignis Brunensis”, la aŭtokonkurson “Grand Prix de Čehio” (ĝi okazas en la kurejo Masaryk, kiu dank’ al sia pozicio en arbaro estas tre ŝatata de konkursantoj), kino-festivalon “Cinema Mundi” ktp. Jes-jes, ĉiam io okazas!

Malgraŭ tio, ke Brno estis en la pasinteco ĉefe industria urbo kaj tio estas rimarkebla ĝis nun, tamen eblas en Brno senti bonan etoson kaj reveni hejmen kun belaj rememoroj.



Homeopatio: la diluita medicino

“Nin kuracas homeopato” – signifoplene rimarkas iu en la kompanio, kaj tuj komenciĝas arda diskuto. Kaj subtenantoj, kaj kontraŭantoj de homeopatio trovas amason da argumentoj, sed kutime ĉio finiĝas per la firma aserto de la homeopati-ŝatantoj: “Sed tio ja helpis al mi!” Ial multaj homoj havas la antaŭjuĝon, ke la tradicia medicino estas armita nur per “misa ĥemio”, dum homeopatio estas kvazaŭ ĉiopova dia scienco, uzanta nur pure naturajn rimedojn. Do, kio estas homeopatio kaj kiel ĝi funkcias?

Aleksej Vodovozov, Rusio


La similan per la simila

La komenco de la 19-a jarcento estis ne tre bona tempo por medicino. La erao de asepso komenciĝos nur en la 1860-aj, Wilhelm Röntgen malkovros siajn radiojn nur en 1895, kaj dume la klasika medicino kuracas per sang-elverŝoj, sublimato (hidrarga diklorido), kaŭterizado kaj aliaj metodoj, kiujn hodiaŭ oni alkalkulus en la plej bona okazo al “popola medicino”, en la plej malbona okazo – al ĉarlatanado.

Christian Friedrich Samuel Hahnemann (1755–1843) ricevis klasikan medicinan edukon en la Lepsika universitato. Komencinte la praktikadon, li komprenis, ke la plimulto de la tiamaj medicinaj metodoj helpas tre malmulte. En 1790 li tradukis el la angla la traktaĵon de brita kemiisto, farmaciisto kaj kuracisto William Cullen “Materia medica”. Ĝuste tiu ĉi verko difinis la direkton por la pluaj esploroj de Hahnemann.

Farinte serion da eksperimentoj pri si kaj pri siaj pacientoj, Hahnemann venis al la konkludo, ke kuracaj substancoj kaŭzas en la organismo la samajn ŝanĝojn, kiel la malsanoj, kontraŭ kiuj agas tiuj kuraciloj. Tiel li metis praktikan bazon por la principo, konata el antikveco: “*Simila similibus curantur*” (“La simila estas kuracata per la simila”). Sian doktrinion li nomis homeopatio (el la helena: ὁμοιος – simila, παθος – suferanta); ankaŭ la terminon alopatio, kiu signifas kuracadon per la kuraciloj, kiuj kaŭzas la simptomojn, kontraŭajn al la simptomoj de la malsano, proponis ĝuste li (el la helena ἄλλος – diferenca, fremda).

Jen la praktika ekzemplo: se cepo kaŭzas larmadon kaj abundan eligon de nazmuko, la preparaĵo el cepo taŭgos por kuraci la nazkataron, kiu estas karakterizata per la samaj simptomoj. En la 19a jarcento tio estis esplorata tre simple: oni proponis al la sana homo dum certa tempo trinki certan preparaĵon. Li skribe fiksas ĉiujn ŝanĝojn, kiuj okazis al li, ĉiujn siajn sentojn. Krome, tiun personon observis Hahnemann mem, same farante skrib-notojn.



Samuel Hahnemann, la fondinto de homeopatio

Tiel oni faris ion similan al datum-bazo. Poste, kiam venis nova malsanulo, oni serĉis en tiu datum-bazo similajn simptomojn kaj trovis la substancon, kiu kaŭzas ilin. Tiu substanco estis uzata kiel kuracilo.

La granda diluo

Dum siaj eksperimentoj Hahnemann venis ankaŭ al la konkludo, ke la diluita substanco estas pli efika, ol se uzi ĝin en pli grandaj dozoj. Se rememori, ke temis pri la substancoj kiel arseniko, sublimato, kinino, ne indas miri. Ja vere – diluita arseniko malutilos al la homo multe malpli, ol la koncentrita veneno. Tiel aperis plia tezo de la Hahnemann-a teorio – la diluado aŭ “potencado”. Ĉiun

novan “potencon” de la kuraca substanco necesis intense sku-miksi por pli bona miksiĝo kaj alproprigo de la “spirito de la kuracilo” al la akvo.

En la homeopatia praktiko la diluadoj povas esti dekumaj, kiam okazas multfoja seria diluado de la origina substrato en la proporcio 1:10 (tiujn oni signas per la litero D), centumaj (1:100, C), milumaj (1:1000, M) kaj kvindek milumaj (1:50000, LM). Plej ofte oni uzas la diluadojn C kaj D. Apud la litero oni indikas la ciferojn, kiuj signifas la vic-nombrojn de la diluado, ekzemple, 12C estas la dekdua centuma diluado. Oni preparas 12C jene: el la origina solvaĵo oni prenas 1 mililitron kaj diluas ĝin per 99 mililitroj da akvo, poste oni intense skuas la miksaĵon, prenas el la rezulta solvaĵo 1 mililitron kaj denove ripetigas la procedon – sume 12-foje.

Siajn spertojn Hahnemann resume prezentis en la granda verko “Ilaro de la kuracarto” (“Organon der Heilkunst”, unue eldonita en 1810), kiun li redaktis kaj reeldonis kvinfoje; la sesa eldono aperis jam post la morto de la aŭtoro. Tiu libro iĝis biblio de homeopatoj kaj deirpunkto por disvastiĝo de homeopatio tra la mondo. Ne eblas ne rimarki, ke komence tiu doktrino estis pli progresema, ol la cetera tiutempa medicino. Diference de la kutimaj kuracistoj, homeopatoj estis pli atentaj pri la spiritaj elementoj de la malsano, viv-kutimoj kaj nutrado. Tamen, per akumulo de novaj informoj la alopatia (laŭ la terminologio de Hahnemann) medicino fine de la 19a jarcento faris grandegan paŝon antaŭen, dum homeopatio restis sur la samaj pozicioj, transformiĝinte en opozicion, sufiĉe malagrablan por la tradiciaj kuracistoj. Ekzemple, la Usona medicina asocio (AMA) estis fondita en 1847 ĝuste por organizi kontraŭstari homeopation.

La principo de kuracado de la simila per la simila ludis certan rolon ankaŭ en la evoluo de la klasika medicino. Kiel ekzemplon oni povas prezenti vakcin-profilaktikon: la malsano estas preventata per enigo de malfortigita aŭ mortigita kontraŭ-agento. Sed la principo de senfinaj diluadoj (en la lasta eldono Hahnemann deklaris ilin plej potencaj kaj efikaj) ricevis neniujn sciencajn pruvojn.

Kial homeopatio ne kuracas

Kaj nun ni parolu pri tio, kion Hahnemann ne povis scii. Temas pri la diluado, traktata de la vidpunkto de pli postaj konceptoj de fiziko kaj kemio pri la organizo de materio. Ni prenu la plej kutiman kuir-salon. Kiel ni scias, ĝia molekula maso estas 58,44, tio signifas, ke unu molo da kuir-salo pezas 58,44 gramojn. Aldone, kiel ni scias, unu molo da kuir-salo enhavas $6,022 \times 10^{23}$ molekulojn da NaCl.

Ni faru el la kuir-salo homeopatiajn diluaĵojn. Kiel originan solvaĵon ni prenu unu litron da akvo kaj solvu en ĝi 58,44 gramojn da natria klorido. Per tio ni ricevos litron

da akvo, en kiu troviĝas $6,022 \times 10^{23}$ da molekuloj de salo. Por prepari la unuan centuman diluaĵon (signatan per la litero C) ni prenas 10 ml el la origina solvaĵo kaj aldonas al ĝi 990 ml da pura akvo. Tio signifas, ke per ĉiu diluado ni malgrandigas la kvanton de la molekuloj je cent fojoj.

Tiel la diluaĵo 1C enhavas jam $6,022 \times 10^{21}$ da molekuloj NaCl, la diluaĵo 10C – jam nur 6012 molekulojn. En la diluaĵo 11C oni povas trovi nur 60 molekulojn de NaCl, dum en la diluaĵo 12C – nur 0,6 de la molekulo. Per aliaj vortoj, ekzistas nur 60-procenta probableco, ke en la diluaĵo 12C oni povus trovi unu molekulon de la origina substanco. Ĝuste ĉi tie troviĝas la teoria klarigo, kial la homeopatiaj preparaĵoj povas (ne)funkcii. Per la sekvaj diluadoj ni simple solvos la akvon per akvo mem, tamen, en homeopatio ja ekzistas la diluaĵoj 30C, 100C, 200C kaj eĉ pluaj.

Ĝuste tiu ĉi punkto restas la plej dubinda por la homoj kun skeptika mens-karaktero. Se en 12C eĉ restos unu molekulo da aganta substanco, kial devas efiki ĝuste ĝi, sed ne la molekuloj de kromaĵoj, kiuj multas en ĉiu akvo? Kial devas efiki ĝuste natrio kaj kloro (kiel en nia ekzemplo), sed ne magnezio, kalcio, fosforo, diversaj organikaj kombinaĵoj? Ja iliaj molekuloj estos ege pli multaj!

Hahnemann mem klarigis tion per la aserto, ke per diluadoj estas transdonata certa “spirito de la kuracilo”; la modernaj homeopatoj ekspluatas la koncepton pri “memoro de la akvo”. Tamen, ambaŭ konceptoj ne povas elteni eĉ plej suprajn kritikojn. Vere, en elektromagneta kampo oni ja povas organizi la akvajn molekulojn en certan ordon, tamen ioman tempon post la forigo de la elektromagneta influo ili revenas al sia origina ĥaosa stato. “Ioma tempo” ĉi-kuntekste signifas “nano- kaj mikrosekundoj”.

Kiel elprovi?

Ĉu eblas, ke ni simple ankoraŭ ne scias ion pri la aranĝo de la naturo? Certe, multo ankoraŭ ne estas konata. Iam la homoj estis certaj, ke radiokomunikado trans Atlantikon estas neebla, sen scii, ke la radi-ondoj estas reflektataj de certaj tavoloj de atmosfero kaj por akcepti ilin oni ne nepre devas troviĝi en la zono de rekta videblo. Antaŭ kelkaj jarcentoj oni entute opiniis la Teron plata...

Tamen radio ja funkcias, kaj tion oni povas elprovi. Sed elprovi homeopation oni ial neniel sukcesas. La plej malnova kaj aŭtoritata medicina revuo “*The Lancet*” regule kaj multfoje publikigis resumojn pri diversaj esploroj, rilataj al homeopatio, la lastan – en 2005. Kaj ĉiam aperis sufiĉe interesa bildo: se la aranĝo de la esploroj estis iom misigita, oni trovis malgrandan, sed tamen pozitivan (ekster la statistika ekarto) efikon de homeopatio. Se la eraroj pri la aranĝo de la esploroj mankis, kaj homeopatio, kaj placebaĵoj havis proksimume la saman efikon.



Diversaj homeopatiuj preparoj

Fakte, jam ekzistas la scienca mekanismo de la elprovo, la t.n. “pruv-medicino” aŭ “objektiva medicino” – ĝi prezentas aron da postuloj pri la organizo de la klinikaj elprovoj, kiu ebligas dividi la semojn disde lolo. La kribrilon de tiu metodo jam malsukcesis trairi multaj alopatis preparoj kaj metodoj, foje eĉ sufiĉe famaj. La samo rilatas al la “alternativa medicino” ĝenerale kaj homeopatio – aparte. Oni neniel sukcesas prui, ke homeopatio kiel tuto funkcias. Nu, almenaŭ ĝis nun oni ne sukcesis...

Kial homeopatio ja kuracas?

La pruv-medicino estas bona afero, tamen, de la alia flanko, ni havas multajn ekzemplojn, kiam post vizito al homeopato la homoj resaniĝis. Foje temas eĉ pri la malsanoj, pri kiuj malsukcesis la “oficialaj” kuracistoj.

Ekzemple, dum epidemio de ĥolero en Londono (19-a jarcento) la mortokvanto en homeopatia hospitalo estis trifoje malpli granda, ol en la kutima. Ankaŭ en nia tempo facile troveblas la homoj, al kiuj homeopatoj vere helpis. Kio estas la kaŭzo? Ĉu temas pri iuj aliaj, “ĝustaj” adeptoj de Hahnemann? Tute ne. Ekzistas kelkaj kazoj, kiam kuracisto-homeopato vere estas tre utila.

Ni rigardu la klasikan ekzemplon pri la londona ĥolero. La klasika medicino tiam ne scipovis bone trakti tiun malsanon, oni kuracis la homojn per sang-elverŝoj,

arseniko, hidrargo kaj aliaj teruraj preparoj kaj metodoj, kiuj mortigis multajn malsanulojn pli rapide, ol ĥolero mem. Samtempe en la homeopatia hospitalo oni proponis al la malsanuloj homeopatiajn preparojn, tio estas – simplan akvon, kiu savis vivon al multaj homoj (la samaj principoj de kurado de ĥolero – la t.n. rehidratado, t.e., enigo de granda kvanto de akvo aŭ jonaj solvaĵoj – estas uzataj ankaŭ nun).

Ankaŭ en nia tempo kelkaj el la homeopatiuj principoj funkcias. Tute ne ĉiuj el la primaraj kuracistoj (kiuj akceptas la plimulton de la pacientoj, suferantaj pro plej diversaj malsanoj) posedas la intelekton de fama d-ro *House*. Krome, dum 12 minutoj, kiuj laŭ la labor-normoj dediĉendas al la primara akcepto de unu paciento, estas preskaŭ neeble ekscii pri li ion detalan, fari la necesajn esplorojn kiel aŭskultumon, palpado kaj perkutadon. Ĉu vi iam aŭdis la vort-kombinon “distrikta homeopato”? Certe, ne. Homeopatoj laboras private, tial ili povas uzi kelkajn horojn por interparoli kun la paciento. Tial homeopato simple posedas pli da informo pri la paciento, do – la kvanto de diagnoz-eraroj (en absolutaj nombroj) ĉe ili estos malpli granda, ol ĉe la tradiciaj “ŝtataj” kuracistoj. Tamen, se oni povus lude ŝanĝi la lokojn, mi dubas, ke la “alternativaj” kuracistoj povus aspekti same brile.

Etaj ruzaĵoj

Homeopatoj ege skrupule elektas siajn pacientojn. Neniu saĝa homeopato konsentos kuraci pneŭmonion, lakunan anginon, pusan otiton aŭ meningiton. Pro la sama kialo oni neniam povis aŭdi pri malsanulo, mortinta post malfacila homeopatia operacio en homeopatia reanimad-fako. Tial sur homeopatoj neniam aperos la etikedo “kuracisto-murdinto”, li ja povas superi ĉion, kion li akceptas – simple pro tio, ke li havas elekt-eblon, kiun ne havas, ekzemple, la kuracisto el ambulanco.

Jen alia ruzaĵo – la uzo de la rimedoj de la alopatia medicino. Ekzemple, por kuraci haŭt-malsanojn homeopatoj preskribas klasikajn homeopatiajn pilolojn kune kun iu unĝento, kiu enhavas zinkon aŭ aliajn elprovitajn kaj reale efikajn substancojn. Samtempe oni faras akcenton pri la piloloj (priskribas, kiel uzi ilin, detaligante horojn kaj eĉ minutojn; klarigas, kun kiuj manĝaĵoj oni povas kombini ilin, kaj kun kiuj – ne), dum la unĝenton oni mencias nur pretere. Atentindas, ke oni devas uzi la pilolojn dum monato, tamen la unĝento uzendas dum nur kvin tagoj (ja pli longa tempo ĉe tia malsano eĉ ne bezonatas!). Kion la paciento opinios kiel la savilon, kiam la problemo malaperos? La demando estas retorika.

Inter alie, surbaze de la ideo pri kombino de la tradicia medicino kaj homeopatio aperis nova doktrino, nomata “homotoksikologio” (aŭ “moderna homeopatio”). Ĝin lanĉis Hans-Heinrich Reckeweg, kiu proponis la teorion pri homotoksinoj (“homaj toksinoj”) en la 1940-aj. La pli granda parto de “homeopati” preparaĵoj, vendataj nuntempe, fakte prezentas bizaran miksaĵon de kelkaj agantaj substancoj. La klasikaj “hahnemannaj” homeopatoj tuj ekatakis la novaĵon, ĉar ĝi malgravigis kelkajn el la plej bazaj principoj – la individuan aliron kaj la permanan preparon de la kuraciloj. En Rusio famiĝis unu el la derivaĵoj de tiu teorio – tiu pri la “skorioj”, de kiuj necesas “purigi”.

Kaj jen la lasta artifiko el la arsenalo de fipraktikantoj de ĉiu ajn speco de medicino – trovi la neekzistantan malsanon kaj poste sukcese savi la pacienton disde ĝi.

Finfine, la pacienton ja kuracas ne medicino, sed la kuracisto. Se li estas klera specialisto, ne vere gravas, kiel li nomiĝas. Se homeopato konsilos al la virino kun ovari-cisto viziti ginekologon aŭ kuracos la ekscies-nutran obezecon per iuj piloloj (kiuj pro hazarda cirkonstancaro estas tute nekombineblaj kun gras- kaj farun-enhavaj manĝaĵoj) – gloron al tiu homeopato, li ja estas vera kuracisto! Sed se homeopato postulas rifuzi antibiotikojn, kiam la paciento havas pusan malsanon, aŭ proponas kuraci per diluaĵoj malarion, tuberkulozon, infanan diareon aŭ aidoson – tio signifas, ke li estas kuracisto diluita je 10C, kaj necesas forigi lin disde la pacientoj laŭeble pli rapide. Fakte, tiu principo kun etaj ŝanĝoj kaj aldonoj validas por la kuracisto de iu

ajn fako – ĉu oficiale agnoskita, ĉu “alternativa”. Gravas, ke estu observata la baza principo, ĉefa por ĉiuj medicinistoj ekde Hipokrato: *Primum non nocere!* (Plej unue – ne malutilu!).

Elrusigis P. Moĵajev

NOTOJ

1. **Placebo** estas inerta substanco, uzata por kompari la efikecon de kuraciloj dum ties esploroj. Por multegaj malsanoj estas pruvita la t.n. placebo-efiko, kiam la enigo de tute inerta substanco tamen helpas al la paciento (oni klarigas tion per psikologiaj kialoj, tamen la mekanismo de tiu efiko estas ankoraŭ ne sufiĉe bone esplorita).

PRI LA AŬTORO



Aleksej Vodovozov estas kuracisto-terapiisto, diplomiĝis ĉe la Sankt-Peterburga Milit-medicina akademio. Li estas ankaŭ medicina ĵurnalisto, scienca redaktoro de la revuo “ABC”, membro de la “Klubo de sciencaj ĵurnalistoj”. Se vi volas, vi povas komenti lian artikolon ruse aŭ angle, uzante lian personan retadreson <voenvrach@voenvrach.ru>, aŭ Esperante – uzante nian redakcian adreson <kontakto@tejo.org>.

Sendormeco

La silento, kiu nun regas, ege kontraŭas la situacion, kiu antaŭ kelkaj horoj minacis la lokon. Neniu vivulo estas videbla, kaj la sola signo, ke antaŭe estis homoj, estas la dikaj fumo kaj polvo, kiuj senĉese leviĝas al la ĉielo, anoncante, ke granda detruo okazis antaŭnelonge. La morna silento estas intensigita de la fakto, ke la tempo de tiu ĉi rakonto estas la unuaj horoj de la mateno, kiam ĉiu estulo portempe rezignas je ĉiutaga aktivado por dorme refortigi sin. Foje en la vivo mallumo sekvas lumon kaj granda ĝojo sekvas grandan malĝojon. Eble pro tio, ke la antaŭan detruon akompanis granda bruoj, la silento de tiu ĉi momento estas timiga.

Gabrielo Olúbùnmi Òshó-Davies, Niĝerio

Ekestas signo de vivo: jen solulo, maljuna viro, kiu ŝajne ne povas promeni sen helpo de la longa apogbastono en sia mano. Ĉu li estas la sola homo, kiu postvivis la detruon? Kvazaŭ sen celo li promenas inter la ruboj lasitaj post la granda batalo, kiu kaŭzis la detruon. Fojfoje li enigis sian longan bastonon en grandan amason da rubo, kvazaŭ li serĉus predon, kaj per sia preskaŭ eluzita forto li provas senrezulte movi ŝtonojn.

Jen la loko, kie la amo estis murdita. Jen la tombo de boneco. Oni ĉi tie adiaŭis lumon kaj brakumis mallumon. Koroj brulbrunigitaj de malamo malbenis unu la aliajn. Manoj leviĝis kaj liveris frapojn. Malĝojo silentigis ridetojn kaj nur la sonoj de ploro aŭdiĝis. Oni diris al malbeno: “Jen mia voĉo, uzu ĝin”. Oni diris al kolerego, ke oniaj manoj estas je ĝia dispono. Sed ĉu ĉio tio necesis? Ĉu oni povas atingi ian Lumon frapante la aliajn? Ĉu la vojo ekde Adamo ĝis nun estas tiom longa kaj kurba, ke la homoj ne plu konas unu la alian?

La malĝojon de tiu maljunulo neniuj vorto povas priskribi ĝuste. Li umas sub la brilanta lumoj, turnante ĉiun kadavron por vidi la vizaĝon de la mortigito, kaj lia vizaĝesprimoj montras, ke li konas ĉiun. La mortintoj havis diversajn religiojn kaj kredojn, diversajn haŭtkolorojn kaj diversan kulturan devenon. Al malsamaj sociaj klasoj ili apartenis. Tamen ili similis laŭ unu maniero: ĉiu el ili apartenis al li. Ĉies nomon li konas. Ekzamenante ĉiun vizaĝon, li literumas ĉies nomon dum li samtempe senĉese dolorĝemas, kaj kvankam lia malĝojo jam estas nepriskribebla alta, post rigardo al ĉies vizaĝo la malĝojo ŝajne atingas pli altan nivelon. Ho, Tero, turniĝu pli rapide por ke tiu ĉi momento rapide foriru.

Grandpene li metas du kadavrojn sur siajn brakojn, unu – sur la dekstran kaj la alian – sur la maldekstran. Tiuj homoj estis el malsamaj rasoj, lingvoj kaj religioj. Lia vizaĝo longdaŭre moviĝas de unu al la alia, kaj li ekparolas

en, ŝajne, antikva lingvo, kaj ŝajnas, ke li admonas. Dum longa tempo li freneze faras la parolon kaj lia voĉo eĥas revene al li, kvazaŭ neniuj en tiu ĉi tragediplena mondo akceptus lian admonon eĉ komprenante lian lingvon.

Kia stulta faro! Pro nura malsimileco homoj mortigas unu la alian, ili ne permesas al la aliaj miloj de similaĵoj gvidi iliajn korojn. Kiom da jarmiloj oni bezonas por lerni, ke ordinaraĵoj estas idiotaj kialoj por forpreni la vivon? Kiam la homoj ektoleremos unu pri la alia?

“Iŝmael! Isaac!” – la viro staras rekte kaj laŭtvokas. “Kiel vi povas dormi?” – li preskaŭ ne povas fini la demandon, ĉar amaraj ĝemoj daŭre forrabas lian forton. “Mi ne povas dormi” – li aldonas klinante sin por ekzameni la vizaĝojn de aliaj mortintoj, kaj en la profundeco de sia malĝojo la luno foje rifuzas pruntedoni al li sian brilecon, kaŝante sin malantaŭ la nubojn, per kiuj Dio mem ŝajne montras malakcepton de la detruo.

Denove li staras kaj apogas sin per sia bastono, ekparolante al iu nevidata homamaso per ege malĝoja voĉo, denove en tiu nekomprenebla lingvo. Dum longa tempo li parolas, forte pik-movante sian bastonon en diversajn direktojn por emfazi siajn vortojn. Kiam patriarko Abrahamo jam eluzas sian tutan forton, li foriras de la loko de la granda detruo kaj de la nevidebla homamaso.

Dum li paliĝas en la kvietan morna nokton, liaj ĝemoj fariĝas malpli aŭdeblaj. Subite li haltas. Nun li estas nur pala silueto, preskaŭ senforma. Tamen pro lia kreskanta voĉo estas klare, ke li nun retrorigardas kaj denove vidas la rubojn, la mortintojn kaj la nevideblan homamason. Kaj li diras per la voĉo tiel sonanta, kvazaŭ li nun ordonas: “Se vi ne povas esti islamanoj, aŭ kristanoj, aŭ judoj, kial ne esti simple homoj?” Kaj dum li turnas sin por daŭrigi sian promenon tra la mallumo, li aldonas: “Tiam mi povos dormi...”

Subtenu la agadon de TEJO!

Ekzistas multe da ebloj helpi TEJO en ĝia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi. Sed vi povas helpi ankaŭ al konkretaj agaderoj de TEJO.

Mondonacojn por ĝenerala agado de TEJO bv. Pagi al la UEA-konto “tejtej” (indiku la celon de la donaco, ekz: “donaco por KER” aŭ “donaco por landa agado”). Ankaŭ eblas fari donacon por specifaj celoj:

- Fonduso “Partoprenu IJKon” – per ĝi TEJO subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj en IJK;
- Pasporta Servo – eble la plej fama eldonaĵo de TEJO.

Por pliaj detaloj pri pagmanieroj, bv. rigardi ĉe <www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html> aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!

JUNA AMIKO – Internacia E-revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj

- aĝas 30 jarojn kaj aperas 3-foje (aprilo, septembro, decembro) sur po 52 plurkoloraj paĝoj kun plenkoloraj kovriloj;
- havas kunlaborantojn el ĉiuj kvin kontinentoj;
- rabato ĝis 50%!

Karakterizas ĝin:

Modela stilo kaj facila lingvaĵo (1500 vortradikoj sen glosoj), *enhavo tre varia*: rakontoj, fabeloj, raportoj, informoj, interesaĵoj, enigmoj, kvizoj, versaĵoj, ludoj, kantoj, humuro, lingvaj konsiloj, interkulturo, kuriozaĵoj, voĉo de legantoj k.a. kun multaj ilustraĵoj.

JUNA AMIKO estas fonto de taŭgaj legaĵoj por komencantoj, fidinda helpilo por E-kursgvidantoj.

Vizitu nian TTT-ejon: <www.junaamiko.inf.hu> aŭ en <www.lernu.net>!

KOTIZTABELO DE UEA POR 2010

MG Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado
MJ(-T) Membro kun Jarlibro (kaj, ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago)
MA(-T) Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto
MA ricevas la Jarlibron, la revuon Esperanto, kaj, ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon Kontakto
SA Simpla abono al la revuo Esperanto, sen membreco en UEA
Kto Abono al la revuo Kontakto, sen membreco en UEA/TEJO
SZ Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)
PT Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO-n (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon Kontakto kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	16	40	100	60	36	200
Aŭstrio/eŭro	10	24	60	38	23	120
Belgio/eŭro	10	24	60	38	23	120
Brazilo/eŭro	5	12	30	18	11	60
Britio/pundo	8	20	50	32	19	100
Ĉeĥio/krono	170	420	1050	670	400	2100
Danio/krono	70	180	450	285	170	900
Estonio/krono	105	260	650	415	250	1300
Finnlando/eŭro	10	24	60	38	23	120
Francio/eŭro	10	24	60	38	23	120
Germanio/eŭro	10	24	60	38	23	120
Greklando/eŭro	10	24	60	38	23	120
Hispanio/eŭro	10	24	60	38	23	120
Hungario/forinto	1700	4300	10750	6850	4100	21500
Irlando/eŭro	10	24	60	38	23	120
Islando/eŭro	10	24	60	36	22	120
Israelo/eŭro	7	18	45	27	16	90
Italio/eŭro	10	24	60	38	23	120
Japanio/eno	1300	3200	8000	4800	2900	16000
Kanado/dolaro	14	35	87	52	31	174
Latvio/lat	4	11	27	17	10	54
Litovio/lido	20	50	130	80	50	260
Nederlando/eŭro	10	24	60	38	23	120
Norvegio/krono	80	200	500	300	180	1000
Nov-Zelando/dolaro	20	50	125	75	45	250
Pollando/zloto	25	60	150	95	55	300
Portugalo/eŭro	8	20	50	32	19	100
Rusio/eŭro	5	12	30	18	11	60
Slovakio/eŭro	7	17	42	27	16	84
Slovenio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Svedio/krono	95	240	600	380	230	1200
Svislando/franko	15	38	95	57	34	190
Usono/dolaro	13	32	80	48	29	160
TARIFO A/eŭro	6	16	40	24	14	80
TARIFO B/eŭro	5	12	30	18	11	60

ALIAJ LANDOJ Luksemburgo laŭ Belgio; Kipro kaj Malto laŭ Slovenio.
TARIFO A Bahamoj, Honkongo, Korea Resp., Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.
TARIFO B Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

ĈU VI SERĈAS KORESPONDAMIKON?

Sendu al Koresponda Servo Mondskala jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj vi deziras, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu 2 internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, ne uzitan poŝtmarkon. La servo estas senpaga por tiuj kiuj loĝas en malriĉaj landoj, laŭ la tarifo B de la kotiztabelo de UEA. KSM transdonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. KSM estas servo de UEA.

Skribu: **Koresponda Servo Mondskala**,
33 rue Louvière, FR-55190 Void-Vacon, Francio
ksmesperanto@wanadoo.fr
www.multimania.com/kosomo

Gangsteraĵo sufiĉe altkvalita

Paŭlo Moĵajev, Ukrainio

“Samideano”, miks-formata KD de Eterne Rima, 18 trakoj kun la suma daŭro de 1 horo kaj 5 minutoj, 15 karaokeaj mp3-dosieroj, tekstolibreto, eld. Vinilkosmo, 2010.

La albumo “Samideano” prezentas la unuan sol-albumon de la pola muzikisto Igor Wasilewski, jam konata en Esperantujo dank’ al lia klubdanca projekto “Lunatiko”, kies populara muzikaĵo “Planedo Esperanto” aperis en la Vinilkosma “Elektronika Kompilo”. Tamen, se Lunatiko prezentis ĝuste la klubdancan muzikon, la albumo “Samideano” prezentas tute alian muzik-specon – iom agreseman kaj akran repon, kiun pro la enhavo de la tekstoj mi kuraĝus nomi (kun la apogo de mia nacia lingvo) “gangstera repo”.

Ja vere, la preferataj teksto-temoj estas riĉo, mono, luksaĵoj, belulinoj kaj senbrida nokta vivo, plena je amuzajoj kaj (eventuale) kontraŭsocia agado. La aŭtoro-plenumato estas iom agresema, memfiera kaj domina. La muzikoj estas same agresemaj, akraj kaj tranĉaj, kvankam tre ritmaj kaj, mi diru, eĉ pasiigaj. La tuta albumo estas plenumita en sufiĉe fiksa kaj samspeca stilo; ĝin variigas nur kelkaj Esperanto-rilataj tekstoj (jen ironiaj, jen iom ekstreme Esperanto-defendaj, sed – ĉiuokaze, iom naivaj, miaopinie, en tiu kadro, sed pro tio – ankaŭ iom amuzaj) kaj kelkaj pliaj remiksaĵoj de la originaj trakoj.

Inter la pozitivajoj de la albumo mi nomus la altkvalitan sonon (nu, ja natura por la eldonaĵoj de Vinilkosmo), sufiĉe alkvalitajn tekstojn (de la gramatika vidpunkto, ĉar de la senca vidpunkto ili ja estas sufiĉe banalaj por tiu ĝenro), bonsonajn rimojn kaj, fine, tre klaran prononcon de la kantisto. Negative min impresis fakte nur la monotoneco de la mizik-aranĝoj (la ŝatantoj de tiu ĉi stilo eble nomus tion “unustileco”, sed mi restas ĉe mia opinio – la muzikaj akompanoj de ĉiuj repaĵoj estas vere tre monotona kaj senvariaj, malgraŭ tio, ke la muzika etoso de la albumo entute al mi persone plaĉis). Krome, en la tekstoj ja troveblas



kelkaj pekoj kontraŭ la gramatiko, ekzemple, la formoj “kontinui bizneson” (transitiva uzo de la netransitiva verbo), “direktigi” (kie sufiĉus simpla “direkti”) aŭ “bani” anstataŭ “baniĝi”. Mistajpoj ŝajne mankas (aŭ almenaŭ ege malmultas) krom la kaptita de mi formo “Konstantinoplo”.

Krom la belan tekstolibreton (kies ilustraĵoj ja subtenas mian supozon pri la “gangstereco” de la albumo – la kantisto estas prezentita sur multaj fotoj kiel vera “reĝo de la strat”) la interesatoj trovos sur la disko ankaŭ 15 karaokeajn versiojn de la surdiskaj kantoj.

Entute do temas, laŭ mi, pri sufiĉe altkvalita, kvankam ja ankaŭ iom specifa produkto. Ĝi certe malmulte taŭgos por plenkreskuloj, sed parto de la junularo, ŝatanta repon, certe trovos per tiu ĉi albumo multon interesan kaj altkvalitan.